# DIA REGNO

• dumonata kristana revuo en esperanto • n-ro 5 (872) • 2008 •

DIA REGNO

ISSN 0167-9554




La haveno Gränna en la lago Vättern en suda Svedio komence de la aŭtuno. Fotis Ágnes Ráczkevy-Eötvös

## KELI

**Kristana Esperantista Ligo Internacia**
**fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA**

**Celo:** *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*



**Prezidanto**: Philippe COUSSON
✉ 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
✆ +33 (0) 549468021;
💻 keli@chez.com

**Sekretario**: Pavel Polnický;
✉ Na Vinici 110/10,
CZ 290 01 Poděbrady II, Ĉeĥio;
✆ +420 325 615 651;
💻 Cea.polnicky@quick.cz

**Kasisto**: Siegfried KRÜGER
✉ Claudiusweg 10,
DE 74074 Heilbronn, Germanio;
✆ +49 7131 162688;
💻 siegfriedkrueger@arcor.de



**Kotizoj:** Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- • pagante al Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. • Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI • Nederlanda poŝtĝirkonto de KELI: 5506132.

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon **www.chez.com/keli/**

---------------

## DIA REGNO

**Oficiala organo de KELI, fondita en 1908**
**dumonata revuo - ISSN 0167-9554**



**Redaktoro**: Bengt Olof ÅRADSSON
✉ Västergårdsg 15; 256 64 Helsingborg; Svedio;
✆ +46 (70) 2004574;
💻 dr_boarad@yahoo.se

**Kontrollegis**: Éva FARKAS -TATÁR



Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).



***Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.***



**Ekspedado:** Pavel Polnický
Vidu la adreson de la sekretario

**Presado:** Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio
💻 info@astroprint.cz

**Eldonmonatoj:** meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec


## ENHAVO


| | |
|---|---|
| Kelkaj pensoj pri preĝado kaj la preĝlibreto *Preĝo por ĉiu Tago* de Jelly Koopmans-Schotanus | 99 |
| El Dia Regno 1967: "Nia laboro ne estas vana en la Sinjoro" | 104 |
| Proponoj kaj rimarkoj rilate al la venontjara kongreso en Wrocław | 106 |
| Aliĝilo al la ekumena kongreso | 107 |
| Listo de aliĝintoj al la ekumena kongreso | 111 |
| Ekumenismo – alvoko de Dio kaj de la vivo | 112 |
| Nia venontjara kongresurbo | 113 |
| Saĝeco kaj doloroj estas kunuloj | 114 |
| Pri Dia Regno numero 4 | 115 |
| Protokolo de la jarkunveno de KELI en Pribylina 2009 | 116 |
| Invitoj por 2009: al seminario kaj al la germana KELI-jarkunveno | 118 |
| Informetoj | 119 |
| Antaŭ la morto | 120 |


## REDAKTORAJ VORTOJ

Kelkaj el ni preskaŭ ne forlasis la someran kongreson kaj tuj komencas la informado por la sekvontjara. Ŝajne ĉio en nia movado turniĝas ĉirkaŭ la kongresoj. Eble estas tute en ordo, ĉar Esperanto signifas komunikilon kaj sen kontaktoj kun aliaj kaj renkontiĝoj ne bezonus komunikilo. Sed certe vi uzas Esperanton ankaŭ aliloke kaj alimaniere ol en KELI-kongresoj. Skribu mallonge kaj raportu kiel kaj kiam vi uzas nian lingvon. Ĉu jam komencis via laborjaro por ke vi plibonigu la lingvoscion ĝis la sekvontjaraj renkontiĝoj? Eble estas bona tempo aĉeti novajn librojn por tralegi. Kaj poste mi multe ŝatus publikigi viajn recenzojn!

# Kelkaj pensoj pri preĝado kaj la preĝlibreto *Preĝo por ĉiu Tago* de Jelly Koopmans-Schotanus

Siegfried KRÜGER, DE

La preĝado apartenas jam de la komenco al la plej gravaj esprimformoj de la kristana kredo. Decida por la kristana preĝo estas la harmonio de la preĝanto kun la volo de Dio. Ĉar ĉio eblas al tiu, kiu kredas kaj fidas al Dio. La regado de Dio signifas akcepti Jesuon kiel Sinjoron, ĉar li kaj Dio estas unu.

La Dio de la Biblio estas vivanta Dio. La homo dankas al Dio la mondon kaj sian vivon. Dio alparolas la homon diversmaniere: per la Vorto de la Biblio, de la prediko, ankaŭ per kunhomoj, okazaĵoj, situacioj ktp. Se ni alvokas Dion, ni aliras de nia flanko ponton, kiun Dio ofertas al ni. Preĝante ni staras antaŭ Dio, por esti je dispono por Li en ĉi tiu mondo. Preĝado kaj agado apartenas kune.

> Ĉar ĉio eblas al tiu,
> kiu kredas kaj fidas al Dio.

Preĝo ne konsistas el penado, ricevi de Dio tion, kio necesas por ĉi tiu vivo. Per la preĝo ni pli vere klopodas Dion mem kapti, la Kreinton de la vivo. Ni ne povas ŝanĝi la volon de Dio, sed homo de preĝo povas malkovri, kion Dio intencas kun li.

La Psalmoj estas la lernejo de la preĝado kaj Jesuo imitenda instruisto.



Kristanoj legas la psalmojn tra la okulvitroj de la Nova Testamento.

La Biblio invitas al preĝado kaj konsilas, ekzemple en:

- 1 Tes 5:17 – Preĝu senĉese;
- 1 Tim 2:1– Mi konsilas do, antaŭ ĉio, fari petegojn, preĝojn, propetadojn, *dankojn por ĉiuj*;
- Rom 12,12 – Estu en espero ĝojaj, en aflikto paciencaj, en preĝado persistaj;
- Mat 7:7 – Petu, kaj estos donite al vi; serĉu, kaj vi trovos; frapu, kaj estos malfermite al vi;
- Psa 50:15 – Voku Min en la tago de mizero; Mi vin liberigos, kaj vi Min gloros.

- Mar 11:25 – Kaj kiam vi staras preĝante, pardonu, se vi havas ion kontraŭ iu; por ke ankaŭ via Patro, kiu estas en la ĉielo, pardonu al vi viajn erarojn.
- Martin Luther: Oni ne povas trovi kristanon sen preĝo, same kiel ne vivantan homon sen pulso.

La preĝado estas forto kaj konsolo, ĝi estas vivata pieco. Preĝado estas pli ol nur parolado, ĝi estas estado en Dio.

**Kelkaj paraboloj de la iama misiisto**

Sadhu Sundar Sing (1889-1929) povas komprenigi la efikon de komunikado kun Dio por kredantoj.

1. La vaporo, kiun efikas la sunvarmo, leviĝas de la tero. Ŝajne ĝi kontraŭas la graviton por poste refali kiel pluvo kaj fruktigi la teron. Same kondutas niaj realaj preĝoj: flamigitaj per la fajro de la Sankta Spirito venkigas ili pekon kaj malbonon, leviĝas al Dio kaj revenas plenaj de siaj benaĵoj al la tero.
2. Birdo sidas kovade sur siaj ovoj. Komence estas en la ovoj nur speco de senforma likvaĵo. Sed per tio, ke la patrino ĉiam sidas sur ili, la senforma maso en ovoj ŝanĝiĝas en la formon de la patrino. La ŝanĝo ne okazas en la patrino, sed en la ovoj. Same okazas, se ni preĝas: ne Dio ŝanĝiĝas, sed ni transformiĝas en lian majestan portreton kaj metaforon.
3. La ŝipo havas sian lokon en la akvo, sed la akvo ne devas eniĝi, tio estas danĝera. Tiel estas juste kaj bone, ke la homo havas sian loĝejon en ĉi tiu mondo. Tiom longe li haltigas sin super la akvo, li povas helpi la aliulojn por ke ili atingu kun li la vivhavenon. Sed signifus morton kaj detruon, se la mondo povus enigi sian koron. Tial la homo de la preĝo konservas sian koron ĉiam por Li, kiu kreis ĝin, por ke ĝi estu Lia templo, kaj tiamaniere li restas en ĉi tiu mondo same kiel en la venonta en paco kaj ŝirmiteco.

   Ni ĉiuj scias, ke sen akvo ni ne povas vivi. Sed se ni subakviĝas, tiam ni dronas kaj mortas. Do, dum ni la akvon uzas kaj trinkas, ni atentu por ne enfaliĝi kaj subakviĝi. Pro tio la mondo kaj mondaj aĵoj devas esti uzataj kun saĝeco, ĉar sen ili la vivo ne nur estus malfacila, sed simple neebla. Dio kreis la mondon, por ke homoj uzu ĝin, sed ili ne devas mergiĝi (droni), ĉar tiam la spiro de la preĝado ĉesus kaj ili pereus.
4. En tre malvarmaj landoj ponto el glacio estas ĝenerala vidaĵo, ekzemple glacia surfaco de lago aŭ rivero, sur kiuj homoj povas marŝi. Se oni parolus en tre varma lando al homoj pri ponto el akvo, ili taksus tion neebla kaj kontraŭ la naturleĝoj.

   La sama granda diferenco estas inter tiuj, kiuj estas novnaskitaj kaj per preĝado flegadas sian spiritan vivon kaj tiuj, kiuj vivas mondece, nur ŝatas materiaĵon kaj ne konas la vivon de la animo.
5. Se ni sur la dorsflankon de vitropeco metas hidrargon/arĝenton, ni posedas spegulon, kiu spegulas nian vizaĝon. Sed se ni ne aldonas arĝenton, tiam ni trarigardas la vitron. Se ni submetas nian vivon kun egoismo, tiam ni en ĝi nur respegulas nin mem; sed se la tavolo de egoismo estas forigita, tiam kie ajn ni rigardas, aperos Dio kaj ni ekkonas, ke ni estas ŝirmitaj en Liaj amataj brakoj.

6. Ĉar kiel la pluvo kaj la neĝo falas de la ĉielo kaj ne revenas tien, sed malsoifigas la teron kaj naskigas kaj produktigas ĝin kaj donas semon al la semanto kaj panon al la manĝanto: tiel estos Mia vorto, kiu eliras el Mia buŝo; ĝi ne revenos al Mi vane, sed plenumos Mian volon, kaj sukcesos en tio, por kio Mi ĝin sendis. (Jes 55, 10-11)
7. Preĝado signifas konversacion kun Dio. Kiu praktikas tian komunecon, tiu similiĝas al Li. Ekzistas speco de insekto, kiu vivas inter herboj kaj verdaj folioj kaj ankaŭ nutriĝas el tiuj: ĝi kolore similiĝas. Ankaŭ la blanka urso, kiu vivas meze de la blanka neĝo havas la saman koloron. Tiel ankaŭ tiuj, kiuj per la preĝo restas en komuneco kun Dio, similiĝos al Li.

Plia rakonto pri tio, kion preĝado povas efiki:

"Miaj preĝoj ne havas sukceson. Dio plenumas al mi neniun peton", tiel iam plendis juna viro. Iun tagon li aŭdis pri pia ermito en la dezerto, al kiu multaj venis por lerni preĝadon. La juna viro ekmarŝis al li kaj petis lin: "Patro, instruu min preĝi, por ke miaj preĝoj ne estu senaŭdite"! La ermito rigardis lin kaj diris: "Ĉu vi vidas la malpuran korbon antaŭ mia kabano? Prenu ĝin kaj alportu per ĝi akvon"! Tion faris la juna viro sed ĉiu akvo defluis el la korbo. La ermito sendis lin denove al la puto. Ĉiam denove. Fine demandis la juna viro: "Kial mi faru tian senutilan laboron? Oni ja ne povas alporti akvon per korbo! El ĝi ĉio defluas". La ermito respondis: "Vidu, tiel estas ankaŭ kun via preĝado. Vi vere ne kunportis akvon, sed la malpura korbo puriĝis. Se vi opinias, ke post via preĝo vi nenion havas enmane, tamen la preĝado purigis vin".

**Preĝspecoj:**

- Bibliaj preĝoj (la Patro Nia, la Psalmoj)
- Petpreĝoj (ankaŭ porpeto)
- Laŭd- kaj dankpreĝoj
- Plendpreĝoj
- Preĝkantoj
- Pacpreĝoj
- Preĝoj por diversaj tagtempoj

Preĝoj celas al: La Triunua Dio, do al Dio la Patro, al Jesuo Kristo, al la Sankta Spirito, per kiu Dio povas alparoli la preĝanton.

**Jelly Koopmans-Schotanus,**
per sia preĝlibreto povas helpi nin trovi vortojn en la sekvado de Jesuo.

La mallongaj spiritplenaj preĝoj indas sekvi ŝian inviton. Rimarkinde estas , kiel ŝi diversvorte alparolas Dion.
(Vidu tabelon sur paĝo 103)

Jen tri preĝekzemploj el la libreto *Preĝo por ĉiu Tago*:

**29.8.** Mia Sinjoro kaj Savanto, donacu al mi Vian pacon. Vi scias, ke mi facile timas kaj ĉiu danĝero kaj bruego ektimigas min. Mi restu trankvila, fortigu min, mi petas.

**30.8.** Potenca Dio, la somero baldaŭ finiĝos, la kutima vivo denove komenciĝas. Helpu nin resti fidelaj por niaj geamikoj, por niaj taskoj, por la multe farenda laboro, kiun ni sen Via helpo ne povas plenumi. Estu kun la malsanuloj kaj subtenu ilin en iliaj doloroj kaj suferoj kaj montru ankaŭ al ili la celon, por kiu ili vivas pro Via graco.

**31.8.** Kara kaj kompatema Patro, restu kun la gastoj, kiuj plenigis mian hejmon en ĉi tiu feria tempo. Benu ilin, kaj des pli, kiam iliaj vivcirkonstancoj estas ege malfacilaj. Via apudesto tamen donos ŝirmon kaj ĝojon,

- Via sankta anĝelo estu kun mi, por ke la malica malamiko ne havu potencon kontraŭ mi. Amen.
- LA KREDKONFESO
- LIBERAJ PERSONAJ PREĜOJ
- PSALMO 103

**Vicigo de la plej ŝatataj preĝoj**
en mia virtemberga eklezio kiel rezulto de demandado:

- LA PATRO NIA
- PSALMO 23
- LA MATENA BENO de Martin Luther
- En la nomo de Dio, Patro, Filo kaj Sankta Spirito. Amen.
- Mi dankas Vin, mia ĉiela Patro, per Jesuo Kristo, Via amata Filo, ke Vi ŝirmis min dum la pasinta nokto kontraŭ ĉiu difekto kaj danĝero kaj mi petas Vin, ke Vi ŝirmu min dum ĉi tiu tago tiel same kontraŭ pekoj kaj ĉiu malbono, por ke tuta mia agado kaj vivo plaĉu al Vi.
- Ĉar mi konfidas min, mian korpon kaj animon kaj ĉion en Viajn manojn.
- Via sankta anĝelo estu kun mi, por ke la malica malamiko ne havu potencon kontraŭ mi. Amen.
- LA VESPERA BENO de M. Luther
- En la nomo de Dio, Patro, Filo kaj Sankta Spirito. Amen.
- Mi dankas Vin, mia ĉiela Patro, per Jesuo Kristo, Via amata Filo, ke Vi ŝirmis min gracoplene dum ĉi tiu tago, kaj mi petas Vin, ke Vi pardonu al mi ĉiujn miajn pekojn, kie mi malbonagis, kaj ŝirmu min gracoplene dum la venonta nokto.
- Ĉar mi konfidas min, mian korpon kaj animon kaj ĉion en Viajn manojn.

Ne forgesu, ke en ADORU estas troveblaj multaj preĝoj.

Kompilinte la antaŭajn penserojn mi trovis en *Espero Katolika 2-3 1971* jenajn pensojn de Francisko Smit (tradukis E. Mulders) sub la titolo *La valoro de la preĝo***.** Li konstatas, ke ni ŝanĝiĝis kaj tial ankaŭ nia bildo pri Dio ŝanĝiĝis. Ekstrakte li skribis:

> "Ŝanĝiĝis la bildo pri Dio kaj estas eble jene direbla: La moderna homo forte konscias pri sia "posedo" de la mondo. Li akiris tiun posedon de la mondo pere de la tekniko, de la homa organismo pere de la medicino, de la menso per la psikologio kaj psikiatrio, de la socia vivo per organizo kaj planoj. Pere de sociaj aranĝoj, ekonomiaj reguladoj, medicina zorgado li solvas problemojn en tute alia maniero ol antaŭe. Kion li per obstina batalo, rigora laŭplaneco kaj akurata prikalkulo venke akiris el la naturo, tio protektas lian kunhomon kontraŭ barbareco, anarkio, malsano, inundoj, malsato, malvarmo kaj mizero. La homo spertas kaj konscias sian konon kaj povon. Li regas la mondon, konkeras terenojn kiujn oni antaŭe konsideris preskaŭ ekskluzive rezervitaj al la ĉiopovo de Dio, al la zorgo de Dio. La propralaŭleĝecon, la aŭtonomion de multaj terenoj, de la tuta

kampo de naturo kaj laboro oni nuntempe laŭvivas kaj spertas kiel ion tute naturan kaj memkompreneblan.

Tion oni nomas la ‘sekulariga procezo’: la mondo iĝas mondo kaj Dio iĝas Dio. Oni malakceptas intermikson de Dio kaj la mondo.

La demando pri la loko de Dio en nia ekzisto, pri lia agado, pro tio iĝas granda problemo. Kiel ni vidu tiun Dion en nia vivo? De tio dependas ankaŭ nia rilato al Li. Tiu rilato devos konformiĝi.“

Pro tiu ŝanĝiĝo de la bildo pri Dio kaj mondo ni devas alimaniere preĝi ol antaŭe. Sed nepre devas preĝi al kaj komuniki kun Dio.

La tabelo montras la diveresajn manierojn per kiuj Jelly Koopmans-Schotanus alparolas Dion en siaj preĝoj en la libro *Preĝo por ĉiu tago.*
(La libro estas havebla ĉe la kasisto kaj ĉe la sekretario)

| | | |
|---|---|---|
| Amata Patro | Ĉiopova Dio | Ho Kristo |
| Ĉiela Patro | Dio de ĉiu kompato | Jesuo Kristo |
| Ĉiopova Patro | Dio de la amo | Kara Kreinto |
| Eterna Patro | Dio de la forto | Kompatema Savanto |
| Ho, kompatema Patro | Dio de la graco | Kompatema, krucigita Savanto |
| Kara ĉiela Patro | Dio, eterna lumo | Kristo, mia reĝo |
| Kara Patro en la ĉielo | Eterna Dio | Mia Majstro |
| Kompatema Patro | Forta Dio | Mia Savanto |
| Kuraĝiga Patro | Graca Dio | Nobla Reganto de la mondo |
| Mia Patro | Granda Dio | Plejpotenculo |
| Mia Patro en la ĉielo | Ho, amanta Dio | Reĝo de la gloro |
| Patro | Ho Dio de la homoj | Reĝo de la paco |
| Patro de ĉio, kio vivas | Ho Dio, mia Patro | Savanto de la mondo |
| Patro de ĉiu bono | Kara, aŭskultanta Dio | Sankta Spirito |
| Patro de ĉiu kompatemo | Kompatema Dio | Ho, Sankta Spirito |
| Patro de ĉiu vivo | Mia Dio | Spirito de la amo |
| Patro de ĉiuj homoj | Mizerikorda Dio | Viviganta Spirito |
| Patro de ĉiuj infanoj | Perfekta Dio | Sinjoro |
| Patro de la amo | Potenca Dio | Amanta Sinjoro |
| Patro de la komenco kaj de la fino | Riĉa Dio | Amplena Sinjoro |
| Patro de la malriĉuloj | Sinjoro Jesuo | Kara aŭskultanta Sinjoro |
| Patro en la ĉielo | Sinjoro mia Dio | Mia Sinjoro kaj Savanto |
| Patro nia | Kompatema Sinjoro | Releviĝinta Sinjoro kaj Savanto |
| Sankta Dipatro | | |
| Sankta Patro | | |

*Republikigo el Dia Regno 1967*




Venis propono ke ni re-publikigu la serion de artikoletoj verkitaj de la tiama prezidanto Adolf Burkhardt, kaj kiu estis publikigita en Dia Regno 1967. En la artikolo, publikigita en la pasinta Dia Regno 4/2008, Pavel Tichý mencias ke li kelkfoje revenis al tiu artikol-serio. Certe ankaŭ al aliaj legantoj tiu serio estos valora legaĵo. Jen la unua artikoleto. /red

# "Nia laboro ne estas vana en la Sinjoro"
## Laborplano de KELI

### Enkonduko

La jarkunveno en Strandbaden 1962 akceptis, laŭ propono de la estraro, laborplanon, kies celo estis montri al kiel eble plej multaj membroj praktikajn eblecojn por kunlabori aktive en tiu branĉo de la Esperanto-movado, kiun reprezentas nia Ligo. Post tri jaroj, en Boldern, oni jam povis konstati, ĉu iuj fruktoj estas videblaj. Kompreneble ne ĉiuj eroj estis jam plenumitaj. Iuj, laŭ sia naturo, devos reveni ankaŭ en estontaj planoj. Tamen realiĝis almenaŭ parto de la punktoj. La plano el Strandbaden estis iom skeleta, nedetala. Verŝajne ne ĉiu sufiĉe atentis pri ĝi. Sed certe necesas la komunaj forto-streĉoj de ĉiuj landaj sekcioj, grupoj kaj individuaj anoj, ĉar ili kune konsistigas nian KELI. Komune ni progresas aŭ stagnas.

La jarkunveno 1966 en Debrecen denove okupiĝis, kvankam nur mallonge, pri la laborplano, kaj estis decidite ellabori la ĝisnunan planon pli detale surbaze de la spertoj, kaj prezenti la erojn en nia organo. Tion mi intencas fari en serio da sinsekvaj artikoletoj. Mi bonvenigas kromajn ideojn aŭ sugestojn. Se ili atingas min ĝustatempe, mi enkorpigos ilin en miajn komentojn.

La unua punkto efektive ne estas ero de plano, sed prefere dezir-esprimo.

***1) Plifirmigi en ĉiu unuopa membro la senton, ke nia laboro ne estas vana [en] la Sinjoro.***

Origine, tio estis unu el la lastaj punktoj iom sen-sisteme aranĝitaj. Strandbaden decidis meti ĝin kiel moton super la tutaĵo, kaj vi do retrovos ĝin ĉiufoje kiam ni parolos pri la temo. Ĝi aludas al la admono de Paŭlo en la unua epistolo al la Korintanoj [I Kor. 15:57-58]. La kunteksto tie indikas la fonton por tiu sento aŭ pli vere verteco, ke efektive la penado ne estas vana: *danko estu al Dio, kiu donas al ni la venkon per nia Sinjoro Jesuo Kristo.* Ĉu ni rajtas pretendi tiun firman, fortigan kaj aktivigan bazon ankaŭ por nia KELI-laboro? Ni konsciu, ke nia moto samtempe forte kuraĝigas nin – mi kredas ke ĝuste ankaŭ en nia KELI-laboro, sed ke ĝi ankaŭ limigas nin: ĝi klare direktas nin denove kaj denove al la Sinjoro, en kies servo ni faras nian laboron ĉie, al kiu ni apartenas en la ĉiutagaĵoj same kiel dum Diservo. Rilate al Li, ni neniam fariĝas memstaraj. Sed tiu ligiteco al Li liberigas nin al energia kaj laŭcela agado. Ĝi forpuŝas la rezignacion – dum ni mem dubas pri la valoro de Esperanto en la servo de la evangelio, ni konvinkos neniun. Kiel ni povas plifirmigi tiun konvinkon pri la seriozeco de nia agado? Ni havas multajn manierojn. Kiu partoprenis kongreson, scias el propra sperto tion kion neinformitaj personoj, eĉ kleraj, pridubas. Kiu atente legas Esperantan gazeton – se eble plurajn – ricevos freŝan instigon el la spertoj de aliaj. Sur nia speciala tereno, la kristana vivo, nia lingvo kaj do nia laboro estas pli necesa ol iam. Ne kredu al iu ajn, se oni klopodas persvadi vin, ke la lingva problemo estas jam solvita per la kelklingvismo, kiun praktikas la grandaj organizaĵoj. Oni ja alkutimiĝis al tre malalta lingva nivelo – sed estas nia tasko konsciigi pri la pli bona solvo, kiun ni praktikas. Respekton ni gajnos ne per ripetado de propagandaj frazoj, sed per klara dismontro de tio kio jam nun estas reala inter ni, kvankam ne ĉie konata. En mia propra medio mi povas konstati, kian respekton oni donas al nia lingvo, kaj ofte akompanas aŭ sekvas ĝin sincera envio.

Kiam vi havas firman konvinkon kaj klaran senton, ke nia laboro ne estas vana en la Sinjoro, tiam vi estas preta fari kion vi povas, ne ŝpari vian forton, talenton, monon kaj tempon. Tiam vi kaj mi vidos progreson.

Fotita dum la kongreso en Berekfürdö



# Proponoj kaj rimarkoj rilate al la venontjara kongreso en Wrocław

Sac. Roman FORYCKI, PL

Miaj proponoj kaj rimarkoj rilate al la venontjara /2009/ ekumena kongreso en Wrocław /Vroclavo/

**1. Rilate al la temo de la kongreso**
La esperantista prilaboro de la temo estu la kontribuo de la kristanaj esperantistoj ne nur al la ekumeno inter si, sed ankaŭ inter ĉiuj kristanoj. Mi konsentas kun frato Cousson, ke dum la Kongreso ni devas ne nur ekumene preĝi, sed ankaŭ dialogi pri la diferencoj, kiuj ankoraŭ dividas nin kiel kristanojn kaj serĉi la unuecon ankaŭ en nia pensado kaj agado kaj proponi la samon al la aliuloj. Kiel kristanaj esperantistoj ni devas porti nian esperon ne nur al ĉiuj kristanoj, sed ankaŭ al ĉiuj homoj, al kio donos la precipan eblecon la venontjara Universala Kongreso en Bjalistoko.

Pro tio dum nia ekumena kongreso en Vroclavo ni devas ne nur fortigi nian kristanan kaj esperantistan reciprokan ekumenon, sed ankaŭ solvadi la ĝis nun nesolvitajn problemojn, kiujn provas solvi pli–malpli efike niaj eklezioj. Tiusence pravas Cousson, ke ni ne limiĝu dum la Kongreso al la banalaĵoj, evidentaĵoj, pri kiuj jam ekzistas la konsento de niaj eklezioj. Tiumaniere ni povus plirapidigi la unuecon, kiun deziras Kristo kaj efike proponi ĝin al la tuta homaro.

Konante pli profunde la ekumenajn problemojn ni povos pli arde peti Dion pri tio, kio por ni estas malfacila kaj eĉ preskaŭ neebla. Al tio povus celi pli konscie niaj ekumenaj preĝoj kaj Diservoj kaj ĉiutaga konduto kaj agado. Kaj estante unu en la espero ni povos pli efike anonci ĝin al la mondo.

**2. Rilate al la vidpunktoj de la prelegoj**
Miaopinie la prelegoj devus temi pri la espero: el la katolika kaj el la protestanta vidpunto, prezentante la instruon de tiuj kristanaj eklezioj kaj komunumoj. Memkompreneble unu el ili devus teni la reprezentanto de KELI kaj la duan reprezentanto de IKUE. Ambaŭ du vidpunktoj devus ankaŭ konsideri la manierojn, per kiuj la kristanoj povas kontribui al la vekiĝo, renoviĝo kaj fortiĝo de la espero de la nuntempa homo kaj kiumaniere povas kontribui al tio la internacia lingvo Esperanto.

**3. Pri la utilo de la temaj laborgrupoj**
Estas utilaj kaj eĉ necesaj temaj laborgrupoj, en kiuj oni povus ne nur diskuti kaj dialogi pri la temo, sed ankaŭ formuli kaj vortigi la plej gravajn postulojn kaj proponojn, taŭgajn por transdoni ilin ankaŭ al la membroj de IKUE, KELI, UEA, al sia propra eklezia komunumo aŭ eĉ al la tuta kristanaro.

# 19-a Ekumena Esperanto-Kongreso (EEK)

**62-a de IKUE** **59-a de KELI**

**18.–25. julio 2009 en Wrocław, Pollando**

**"... fido, espero kaj amo, tiuj tri (1 Kor 13, 13)**
**espero kristana aŭ monda senespero"**

**IKUE kaj KELI invitas la kristanan esperantistaron al 19-a Ekumena Esperanto-Kongreso** en Wrocław (Vroclavo), Pollando. Tiu urbo Vroclavo estas unu el la plej grandaj kaj belaj urboj de Pollando. La kongresejo estos la Porpastra Alta Seminario (Seminarium Duchowne, Plac Katedralny 14, 50-329 Wrocław), kiu situas sur Ostrów Tumski kaj najbaras kun Katedralo de S-ta Johano Baptisto. Jam en la 9-a jarcento ekzistis sur insulo fortikigita princa kastelo kun vasta sub-urbo inter brakoj de la rivero Odra. En 1000-a jaro, kiam oni establis episkopejon en Vroclavo, la kastelon oni transigis sur maldekstran bordon de la rivero Odra.

Malantaŭ la kastelo oni konstruis dum la 14-a ĝis la 16-a jc. multajn sakralajn objektojn: preĝejojn, episkopan palacon, ktp. Proksime troviĝas botanika ĝardeno sur la loko de likviditaj urbaj fortikaĵoj.

Ostrów Tumski ĉesis ekzisti kiel insulo en la 19-a jarcento, kiam oni superŝutis malnovan fluejon de rivero Odra. La hodiaŭa Ostrów Tumski estas unu el multaj turismaj allogaĵoj de la urbo. Promenante oni spertas atmosferon de pasinteco kaj oni povas travivi la ĉarmon de tiu ĉi heredaĵo.

La vroclavanoj estas homoj toleremaj. De la komenco de nia historio en Vroclavo ekloĝis homoj de diversaj landoj, do samtempe de diversaj religioj. Pace kunvivis katolikoj, ortodoksuloj, judoj kaj protestantoj. Tiel estas ĝis hodiaŭ. En Vroclavo ekzistas "Dzielnica Czterech Świątyś" (kvartalo de kvar sanktejoj). La urbo estas vere ekumenisma. Ĝi estas nomata "la urbo de renkontiĝo".

---

Ni kore invitas vin aliĝi al la 19-a Ekumena Esperanto-Kongreso en Wrocław, Pollando, 2009

**Philippe COUSSON** kaj **Miloslav ŠVÁČEK**, prezidantoj de KELI kaj IKUE, kaj **Teresa POMORSKA** <pomer@wp.pl>, membrino de LKK. Oni povas ankaŭ informiĝi ĉe: Silezia Esperanto-Asocio <vroclavo@poczta.onet.pl>

Atentu la informojn daŭre aktualigotajn en: www.Bernhard-Eichkorn.de

**Aliĝilo** sendota al
Teresa Pomorska, ul. Świstackiego 9/21, PL 50-430 Wrocław, Pollando
<pomer@wp.pl>
*Geedzoj kaj familioj bezonas nur unu aliĝilon.*
*Gepatroj kun infanoj utiligu sube ankaŭ la n-ron 2.*

**1. Unuopulo/patro:** Nomo: ______________________
*Bonvolu skribi vian familian nomon MAJUSKLE kaj la personan nomon minuskle!*

Adreso: ______________________

Telefono: ______________ Reta adreso: ______________

**ĉambroj:** Mi mendas (bv. krucsigni en krampoj):
( ) **unu-litan** ĉambron,
( ) **du-litan** ĉambron kun jena kunul/ino en mia ĉambro:

______________________

( ) Tio estas mia edzino, por kiu mi ne plenigas plian aliĝilon.

( ) Mi volas partopreni la kongreson sen tranoktoj en la kongresejo, sed kun du manĝoj tage *(atentu 5.2.)*
( ) Mi/ni volas veni jam vendrede. *(Atentu la plian prezon sub 6.)*
( ) Mi/ni estas (ge)junuloj; naskiĝ-datoj: ______________

**2. Aliĝo de familio:** patro *(ripeto de 1.)*: ______________

2.1. patrino *(adreso kiel patro 1.)*: ______________

2.2. infano/j *(antaŭnomo/j kaj enkrampe aĝo)*: ______________

2.3. ( ) Jenaj infanoj loĝu en ĉambro apud ni *(enkrampe aldonu la aĝon de la infanoj)*:

______________________

**3.5. Manĝoj:** *(normale vi ricevos tri manĝojn: matene, tagmeze kaj vespere):*
3.6. ( ) Mi/ni deziras vegetarajn manĝojn.
3.7 ( ) Mi/ni **ne partoprenos** la tuttagan **ekskurson** (minus 10 € ).

3.8. Mi proponas jenajn **miajn kontribuojn al la kongresa programo:**
*Temo(j) kaj daŭro(j)*: ______________

______________________

**Dato/loko/subskribo:** ______________
La aliĝo validas post alveno de la aliĝ-kotizoj.

**Distranĉu la folion kaj forsendu la maldekstran duonon, ĉi-duonon retenu ĉe vi!**

**Prezoj:**

**4.** **Kongresa aliĝ-kotizo** *(ne infanoj ĝis inkl. 9 jaroj)*: por validigi la aliĝojn; en kazo de nepartopreno la aliĝ-kotizo estas ne repagebla.

| | | | |
|---|---|---|---|
| ĝis 31.12.2008: | 20 €, | Poloj: | 70 Złoty; |
| ekde 1.1.2009 ĝis 31.3.2009: | 30 €, | Poloj: | 100 Złoty; |
| ekde 1.4.2009: | 40 €, | Poloj: | 130 Złoty. |

**5.** Kontojn vidu sub punkto 9. ĉeĥoj pagu al Miloslav Šváĝek.

5.1 **Kongres-kotizo** pagenda en la kongresejo por la tempo de 18.7.09 ekde la vespermanĝo je 18h15 ĝis 25.7.09 matene.

Prezo **kun tranoktoj kaj po tri manĝoj**:

- en unu-lita ĉambro: 760 Złoty (somere 2008 = 230 €)
- en du-lita ĉambro por unu persono: 480 Złoty (somere 2008 = 145 €)
- familianoj ekde 10 jaroj por unu persono: 300 Złoty (somere 2008 = 90 €)
- junul/ino ĝis 24 jaroj en du-lita ĉambro: 300 Złoty (somere 2008 = 90 €)

5.2 Prezo **sen kongresaj tranoktoj**, sed kun tag- kaj vespermanĝoj por unu persono: por la tuta semajno 220 Złoty kaj la aliĝ-kotizon.

5.3 **Atentu! Nemembroj de IKUE/KELI** pagos 20 € /66 Złoty pli ol indikite. Kunportu vian membro-kvitancon 2009, por pruvi vian mem~~bre~~con!

Ankaŭ ĉiu familiano pagos 20 € /66 Złoty pli ol indikite, se ne almenaŭ unu el la gepatroj montros sian membro-kvitancon 2009 de IKUE aŭ de KELI.

5.4 Sub **familio** oni kalkulas minimume patron aŭ patrinon kaj infanon ĝis 24 jaroj, kaj maksimume gepatrojn kun siaj infanoj malpli ol 24-jaraj antaŭ 25.7.09.

## Por via rememoro!

*(signu por via memoro denove sur ĉi-flanko de la folio, kion vi maldekstre elektis)*

<u>Mi mendis:</u>

( ) **unu-litan ĉambron**: 760 Złoty (somere 2008 = 230 €) ;

( ) **du-litan ĉambron** (prezoj por unu persono): 480 Zł (somere 2008 = 145 €);

( ) **lokon por junul/ino** ĝis inkluzive 24 jaroj: 300 Zł (somere 2008 = 90 €).

( ) **ĉambrojn por familianoj** (gepatroj kaj infanoj ĝis 24 jaroj: 300 Zł )

( ) **ĉambron por junul/ino** ĝis inkl. 24 jaroj: 300 Zł (somere 2008 = 90 €).

Se mi ne havos kaj ne montros membro-kvitancon 2009 de IKUE aŭ KELI, mi pagos 20 €/66 Złoty pli ol indikite. Mi ne forgesu kunpreni BIBLION kaj preĝ- kaj kantlibron ADORU, kiun mi ankaŭ povos aĉeti aŭ lupreni en akceptejo.

6. **Kiu venos jam vendrede,** povas tranokti pagante por tranokto 66 Zł (somere 2008 = 20 €), sed oni mem zorgu pri la manĝoj ĝis sabato 18h15.

7. Kunportu vian **BIBLION. Ankaŭ la libro ADORU estas grava parto de la 19-a EEK.** Nepre ĝin kunportu, aŭ aĉetu por prezo de 10 € post alveno en akceptejo. Oni povas ĝin ankaŭ pruntepreni por la tuta kongresa semajno por lu-pago de 5 €.

8. Post plenigo de loĝkapacito en porpastra seminario, oni proponos al la pli malfruaj aliĝintoj loĝigon en studenta hejmo aŭ hotelo.

9. Kongresa Kaso:

   - **en Pollando:** Teresa Pomorska, Lukasbank konto: PL 69 1940 1076 4939 1150 0000 0000;
   - **en Ĉeĥio:** aliĝ-kotizon en € aŭ ĉeĥaj kronoj al Miloslav Šváček, Tršická ul. 6, CZ- 75127 Penčice;
   - **el Eŭropa Unio**: Bernhard Eichkorn, K-to 21 193 704 ĉe Postbank Stuttgart BLZ 60010070, IBAN: DE95 6001 0070 0021 1937 04; BIC: PBNKDEFF,
   - aŭ: **UEA-konto** echk-x de Bernhard Eichkorn. Tiam nepre sendu informon al: B. Eichkorn, Romäusring 20, D 78050 Villingen <eichkorn.b@t-online.de>.

## Provizora kongresa program-skizo

**Vendredo, 17. julio 2009:**
Akcepto: 16h–18h, 20h–21h.

**Sabato, 18. julio 2009:**
Akcepto: 10–12h, 15–17h, 19–21h,
18h15 Vespera manĝo,
19h30 Inaŭgura vespero (ADORU).

**Dimanĉo, 19. julio 2009:**
08h15 Matena manĝo,
Solena Sankta Meso (tempo difinota),
10h30 Evangeliana Diservo,
13h00 Tagmeza manĝo,
17h00 Ekumena Diservo (ADORU),
18h15 Vespera manĝo,
19h30 Solena malfermo (ADORU).

**Dumsemajna ĝenerala programo:**
07h00 Sankta Meso (kun ADORU),
07h45 Ekumena preĝo (ADORU),
08h15 Matena manĝo,
09h00 Komuna kantado (ADORU),
10h00 kaj 11h00 Prelegoj,
12h30 Tagmeza preĝo (ADORU),
13h00 Tagmeza manĝo,
16h00 kaj 17h00 Prelegoj,
18h15 Vespera manĝo,
20h00 Vespera programo.

**Merkrede, 22. julio:**
Tuttaga ekskurso al Świdnica.

**Sabato, 25. julio 2009:**
Adiaŭa mateno

# 19-a Ekumena kongreso 2009 en Vroclavo

## Listo de aliĝintoj ĝis 09.10.2008

| | | | |
|---|---|---|---|
| 001 | Sac. | FORYCKI Roman, sac. | Pollando |
| 002 | S-ro | ŠVÁČEK Miloslav, s-ro | Ĉeĥio |
| 003 | S-ro | COUSSON Philippe | Francio |
| 004 | Sac. | EICHKORN Bernhard, sac. | Germanio |
| 005 | S-ro | TUINDER Jacques, s-ro | Nederlando |
| 006 | S-ino | TUINDER Vera, s-ino | Nederlando |
| 007 | S-ro | ÅRADSSON Bengt Olof | Svedio |
| 008 | S-ino | RÁCZKEVY-EÖTVÖS Ágnes | Hungario |
| 009 | S-ro | ÅRADSSON Andreo | Hungario |
| 010 | S-ro | GAILLARD Samuel | Francio |
| 011 | S-ino | REHM Britta | Svedio |
| 012 | S-ino | BAGI Irén | Hungario |
| 013 | S-ino | BÁNÁTI Katalin | Hungario |
| 014 | S-ro | POLNICKÝ Pavel | Ĉeĥio |
| 015 | S-ro | KRÜGER Siegfried | Germanio |
| 016 | S-ino | SABOLCIU Birta | Rumanio |
| 017 | S-ino | BELOŠEVIČ Marija | Kroatio |
| 018 | S-ino | SZCZEPAN Zofia | Pollando |
| 019 | S-ino | LATACZ Helena | Pollando |
| 020 | S-ino | KAŹMIERCZAK Zdzisława | Pollando |
| 021 | S-ino | NOWAK Jadwiga | Pollando |
| 022 | S-ino | TOUŚCIUK Stanisława | Pollando |
| 023 | S-ino | HARĘŹLAK Elżbieta | Pollando |
| 024 | S-ino | ZMITROWICZ Krystyna | Pollando |
| 025 | S-ro | WASILEWSKI Bohdan | Pollando |
| 026 | S-ino | BOLEK Maria | Pollando |
| 027 | S-ino | POMORSKA Teresa | Pollando |
| 028 | S-ino | KUBICKA Mirosława | Pollando |
| 029 | S-ro | SARANDREA Carlo | Italio |
| 030 | S-ro | SOROSINA Felice | Italio |
| 031 | S-ro | FLEISCHMANN Rüdiger Robert | Germanio |
| 032 | S-ro | KOVÁŘ Jan | Ĉeĥio |
| 033 | S-ro | DAMINELLI Giovanni | Italio |
| 034 | S-ro | BOSCHIN Serio | Italio |
| 035 | S-ino | ZUCCACCIA ARMSTEAD Lucia | Italio |
| 036 | S-ro | VENCL Jiří | Ĉeĥio |

| | |
|---|---|
| Ĉeĥio | 4 |
| Francio | 2 |
| Germanio | 3 |
| Hungario | 4 |
| Italio | 5 |
| Kroatio | 1 |
| Nederlando | 2 |
| Pollando | 12 |
| Rumanio | 1 |
| Svedio | 2 |

# Ekumenismo – alvoko de Dio kaj de la vivo

Verkita de Therezinha Motta Lima da Cruz

Tradukita de Vitor LUIZ, BR

La kristanoj pli aĝaj, kiuj ricevis la unuan edukon pri la kredo en alia epoko, certe memoras, ke ekumenismo ne estis parto de la babilado en la eklezioj. Multaj eĉ memoros, ke ili kreskis en etoso ĝuste mala ol la ekumenisma sinteno, ĉiam aŭskultante kritikojn, kondamnojn, historiojn, kiuj montris la aliajn ekleziojn ĉiam kiel pekajn, malpravajn, falsajn. Eĉ nuntempe oni facile povas trovi religiajn librejojn, kies materialoj iomete similas al "milit-manlibroj", kiuj instruas la leganton elmontri per pruvoj, ke tiu aŭ alia eklezio estas la sola vojiranta tra la ĝusta vojo.

En tiuj novaj tempoj, la Spirito de la Eternulo direktigadas la ekleziojn malrapide, sed daŭre, sur la vojo de proksimiĝo kaj dialogo. Kelkaj jam paŝis multon, aliaj ankoraŭ ne komprenis la urĝecon de tia alvoko, kiu – malgraŭ ĉio – estas ĉie.

Abundas la iloj, kiujn la graco de Dio uzas por ke la mondo rigardu nin kiel unu, en granda familio. La unueco de tiu familio ne devenas de la egaleco de ĉiuj. Fakte, familio estas ja spaco de kunvivado je diverseco: viroj kaj virinoj, knaboj kaj geavoj, profesioj kaj taskoj, horoj kaj vidpunktoj diversaj. Nenio agrabla estus en familio de klonoj. Tamen, la diverseco en bona familio ne taŭgas por disigi, sed taŭgas por ke la talentoj sin komplementu kaj igu la familian grupon pli riĉa je ebloj. Ĉar ĉiuj estas malsamaj, pli granda estas la interlernado, kaj pli granda diverseco de konkeroj iĝas ebla.

La doloriga historio de disiĝo de eklezioj disŝiris la kristanan familion. Dio, tamen, ne rezignis vidi nin repaciĝintaj. Granda ilo de la Providenco estas la nepraj bezonoj de la vivo. La homaj doloroj, ekzemple, estas tre universalaj: ili ne elektas konfesion, ne dependas de la doktrino akceptita. La homa digneco ankaŭ loĝas trans ajna etikedo kaj postulas defendon, pli antaŭa ol la demando pri la grupo, al kiu la koncerna homo apartenas. Tiu estas unu el la centraj mesaĝoj de la parabolo de la bonkora samariano. La homo falita sur la vojo ne estas identigita: oni ne diras, ĉu li estas judo, pagano, religiulo, bona, malbona... Li posedas la solan aspekton, kiu gravas por iĝi alvoko de Dio al la vojiranto: li estas necesanto. Sed la kurioziga afero ne estas ĝuste tio. Jesuo subtile enmetas en la parabolon incitantan fakton: la vojirantoj, male ol la falinto, estas identigitaj de siaj religiaj postenoj. Temas pri pastro kaj levido, konsideritaj kiel fidelaj al la judaj tradicioj; ankaŭ venas samariano, kies situacio estis ja malsama. Ekde la Transloĝiĝo, la samarianoj, for de la religiaj ĉefoj deportitaj en Babelon kaj je kontakto kun la paganaj popoloj, perdis iom da fideleco al la kutimaj tradicioj de la kredo. Kaj la samariano estas tiu, kiu faras la ĝustan agon, kaj li estas indikita kiel modelo. Jesuo, fidela judo praktikan-

ta, ne malvalorigas sian propran tradicion. Li volas meti en ŝakon la honorsenton de siatempaj religiuloj. Kvazaŭ li estus demandanta: Ĉu vi ne hontas pri tio, ke vi estas malpli sentemaj ol tiuj, kiuj ne venas al la templo?

Se ni volus doni finon ja feliĉan al tiu parabolo, eble la plej bela versio estus, ke la pastro kaj la levido trovas la samarianon kaj ĉiuj tri kune helpas la proksimulon vunditan... Ĉio indikas, ke Dio stimuladas ion similan inter la sekvantoj de Jesuo. La jam ekzistantaj ekumenaj organizoj kaj laboroj produktas ion, kio ĝojigas la koron: kristanoj de diversaj nomoj unuiĝintaj por helpi nian vunditan mondon. Kion vi pensas pri koni tian vojon pli bone?

Tiuj ĉi estas kelkaj ekumenaj organizoj en Brazilo:

CONIC (Conselho Nacional de Igrejas Cristãs do Brasil): Nacia Konsilo de Kristanaj Eklezioj de Brazilo

CESE (Coordenadoria Ecumênica de Serviços): Ekumena Kunordigejo de Servoj

CESEP (Centro Ecumênico de Serviço e Educação Popular): Ekumena Centro de Servo kaj Popola Edukado

CEBI (Centro de Estudos Bíblicos): Centro de Bibliaj Studadoj

KOINONIA

CLAI BRASIL (Conselho Latino-Americano de Igrejas – Setor Brasil): Latin-Amerika Konsilo de Eklezioj – Sekcio Brazilo

# Nia venontjara kongresurbo




Vroclavo (pole Wrocław – elparolu [vrocŭav]; estas la 4-a plej granda urbo de Pollando, situanta ĉe la rivero Odro. Ekde la fino de la dua mondmilito ĝi estas la ĉefurbo de la pola vojevodio Malsupra Silezio en la sudokcidenta parto de Pollando; ĝis la fino de la dua mondmilito ĝi apartenis al Germanio kaj nomiĝis Breslau. Laŭ legendo la urbo estis fondita ĉirkaŭ la jaro 1000 de la ĉeĥa princo Vratislav la 1-a (kaj nomita laŭ li). Dum la mezepoko, la urbo apartenis al la komerca ligo Hanso.

(fonto Vikipedio)

Aktualaj kongresaj informoj regule aperados ankaŭ sur la ttt-pagxoj de la Ĉeĥa IKUE-Sekcio www.esperanto.cz/ikue aŭ http://mujweb.cz/Spolecnost/Svacek/ kaj sur la ttt-paĝoj de IKUE kaj pastro B. Eichkorn.

# Saĝeco kaj doloroj estas kunuloj...

Jacques TUINDER, NL

En malgranda Hinda reĝolando, kie nune situas Nepalo, antaŭ ĉirkaŭ dudek kvin jarcentoj vivis princo. Sidharta Gautama estis lia nomo. Li havis edzinon kaj etan filon. Lia patro, la reĝo, klopodis zorgi pri tio ke lian filon ne trafu io malbona. Sed Sidharta sincere deziris esplorrigardi la mondon. Kvarfoje li forlasis la palacon. Dum la unua vojaĝo li vidis

Neniu povas nei ke, danke al la ĉielo, ankaŭ en niaj tagoj troviĝas homoj kiuj emas serĉi novajn vojojn por spirite evolui.

viron kiu apogis sin sur bastono. Tion li ankoraŭ neniam antaŭe estis vidinta, kaj li demandis al sia servisto: "Kio okazis al ĉi tiu viro?" – "Tiu homo estas maljuna, princo", li respondis. "Iam ni ĉiuj estos alt-aĝaj". Duan fojon Sidharta vidis viron kiu kuŝis vojorande. "Tiu viro estas malsana", rakontis lia servisto. "Ĉiuj homoj povas malsaniĝi". Trian fojon li vidis homojn kiuj havis portilon kun pakaĵo tolaĵe kovrita sur la ŝultroj. "Sur la portilo kuŝas mortinto. Ili kondukas lin al la brulŝtiparo. Iam ni ĉiuj estos mortintaj."

La princo estis forte kortuŝita pro ĉiu suferado, kiun li antaŭ siaj vojaĝoj ne estis spertinta. Kostis al li penon forlasi la palacon por la kvara fojo. Tiam li renkontis viron, kies vizaĝo disradiis grandan pacamon. Eĉ pli pacama ol la pacamo mem! "Kio okazis al ĉi homo?" li demandis al sia servisto. "Princo, li estas asketo. Li klopodas venki la suferadon." Sidharta respondis: "Permesu do al mi iri la vojon de tiu viro." Kaj li forrazis siajn kapharojn, kovris sin per simplaj vestaĵoj, eliris el la palaco, forlasis edzinon kaj filon, serĉante instruistojn kiuj povus rakonti al li pliajn detalojn pri tiu spirita vojo. Kaj el la riĉa princo Sidharta li finfine fariĝis Budho la Klarpensa, la fondinto de vivkoncepto kiu inspiros grandan parton de Azio, sed ankaŭ homojn en aliaj partoj de la mondo.

Neniu povas nei ke, danke al la ĉielo, ankaŭ en niaj tagoj troviĝas homoj kiuj emas serĉi novajn vojojn por spirite evolui. Unu el la vojoj estas meditado. Mi konas virinon kiu renkontis monaĥon el Tajlando. Li fariĝis ŝia instruisto. "Ĉu vi jam pli frue meditis?" li demandis. Ŝi respondis ke ŝi estas kristanino. Nu, li povus instrui al ŝi alian formon de meditado, sed ne necesis fariĝi budhanino. "La Budho sendis monaĥojn en la mondon kun la mesaĝo fari homojn feliĉaj, ne por konverti ilin al budhismo", li komentis.

Grava kaj centra temo por la budhis-

mo estas la suferado. Eblas resumi ĉion en kvar tezoj aŭ noblaj veroj:

– Ĉiu vivado estas nedisigble ligita kun suferado. Ĝi estas konsekvenco de la fakto ke ĉio submetiĝas al ŝanĝiĝoj. Nenio eterne restas. Feliĉo povas malaperi de unu momento al alia, kaj kiu opinias sin feliĉa kun materia riĉo, ofte havas zorgojn pro tio kiel konservi ĉi riĉon. Tial oni nenion povas daŭre kaj fikse teni en la manoj. Malgraŭ tio ni alkroĉiĝas al multaj personoj kaj aferoj en la vivo: parencoj, amikoj, posedaĵoj, kulturo kaj tradicioj. La vivo tamen ne estas kontrolebla nek regulebla.

– Ĉiu suferado havas kaŭzon, nome ke ni emas ĉion por ĉiam konservi. Tio fontas el nia avido kaj nia nescio. Kontraŭbatalante ĉagrenon aŭ dolorojn, oni nur pligrandigas ilin!

– Eblas levi la suferadon. Kaj levi estas io alia ol komplete forigi. Kiam vi volas tiel forkuri de la suferado, vi nenion lernas. Se prezentiĝas suferoj, vekrii, koleri kaj nei neniel helpas. Pli bone estas klopodi kompreni kaj doni al ĝi signifon kaj tiel alimaniere rilati kun ĝi. Saĝeco kaj doloroj vojaĝas kune.

– La vojo kiu levu la suferadon kaj konduku al kompreno nomiĝas *la okobla pado*:

- ĝuste paroli, ĝuste agi, ĝuste vivi (= tri etikaj reguloj);
- ĝuste fortostreĉi, ĝuste koncentriĝi, ĝuste atentemi (= tri elementoj de meditado);
- ĝuste kompreni kaj ĝuste pensi (= du formoj de saĝeco).

Budhismo estas pli ol vivkoncepto, ĝi estas vivmaniero, en kiu sinakceptado, animtrankvileco, koncentriĝo, meditado, kompato kaj bonfarado ludas esencan rolon.

☙

---

## Pri Dia Regno nr-o 4

Min ĝojigis la bona aspekto de DR n-o 4 kun la kongreso en Slovakio trafe bildigita en nova, ĉu ni diru radikala, maniero. Espereble ĝi stimulos al pli da partoprenontoj.

Plaĉis al mi retrovi en la revuo la predikon de Pavel Klimeš, inter aliaj bonaj kontribuoj, sed la brazilaj pensoj pri ekumenismo estis por mi iom strangaj. La *Eklezion* ja formas ĉiuj kristanoj kune, kio manifestiĝas per nia partopreno en la Sankta Manĝo, la eŭkaristio.

Aliaĵoj estas flankaj aferoj, al kiuj ni homece metas pli malpli varie gravajn signifojn. Ĉu ne?

Åke Ahlrén, SE

# Protokolo de la jarkunveno de KELI Pribylina, la 1-an de aŭgusto 2008

Partoprenis 7 estraranoj:
Philippe Cousson (FR),
Pavel Polnický (CZ),
Siegfried Krüger (DE),
Bengt Olof Åradsson (SE),
Irén Bagi (HU),
Jacques Tuinder (NL),
Samuel Gaillard (FR),
pliaj 23 membroj kaj 1 gasto .

1 **Malfermo**
La prezidanto Philippe Cousson legis el Psalmo 131 kaj poste oficiale malfermis la jarkunvenon. Ni kantis kanton 542.

2 **Elekto de kunprotokolantoj**
Proponitaj Wil van Ganswijk (NL) kaj Sieglinde Stamm (AT) estis akceptitaj.



Partoprenantoj. Fotis Ágnes Ráczkevy-Eötvös

3 **Tagordo** akceptita sen ŝanĝoj.

4 **Komunikoj**
Sekretario P. Polnický legis salutleterojn de TOLE-prezidanto Boĵidar Leonov, Olavi Kantele, Jean Bisset, Geza Mezei kaj Benata Hengstmengel-Koopmans.

5 **Funebra memorigo**
De la pasinta kunveno mortis jenaj membroj: Lilli Vikström – Svedio, Erikas Laiconas – Litovio, Hilda Tharme – Britio kaj Pavel Tichý – Ĉeĥio. Starante ni rememoris ĉiujn.

6 **Sekretaria raporto**
Estis publikigita en DR. Preparis ĝin Els van Dijk-Kuperus (ekssekretariino) kaj Pavel Polnický, kiu kompletigis ĝin per informoj pri: Madagaskaro – dum la landa kongreso ili preparas fondon de loka KELI sekcio. Bulgario – Ivanka Stoyanova dissendas DR al kelkaj personoj proprakoste, estus necese, ke ili pagu almenaŭ sendokostojn kaj parton de la abono. Britio – daŭre estas tri esp. diservoj jare – dum Brita kaj Skota kongresoj kaj okaze de

skota Studsemajnfino. Frato Karl Heinz Schaeffer informis pri esp. diservo en Stuttgart. Sekretario konstatis, ke en la raporto povas esti menciita nur tio, pri kio li estis informita!! Ne ĉiuj sekcioj reagis al lia peto pri informoj… Raporto estis akceptita.

7 **Kasista jarraporto**
Ankaŭ estis detale publikigita en DR kaj la kasisto respondis demandojn. Je la jarfino ĉiuj stokantoj de libroj kaj kasedoj estas petataj inventari kaj raporti al la kasisto. Ni ricevas relative ofte petojn por senkosta abono de DR el afrikaj landoj. Necesas subteni la Adoptan Kason. Ankaŭ helpopetoj venas el afrikaj landoj, kiuj ofte postulas tro. Unuarange ni ja subtenas agadon EVIDENTE. Estis demandoj pri financaj rezultoj de ekumenaj kongresoj. Detalojn ni tute ne konas.

8 **Raporto de la kaskontrolantoj**
Protokolon legis K. H. Schaeffer kaj fine proponis, ke ni akceptu kasistan jarraporton kaj dankis al kasisto. Akceptita kun aplaŭdo. ( Ĉar ne estis elektitaj novaj kaskontrolistoj ni petas ĝisnunajn daŭrigi funkciadon.)

9 **Buĝetojn 2008 kaj 2009** publikigitajn en DR jarkunveno akceptis. La fortiĝojn de la CZK multekostigos nian gazeton.

10 **Raporto de la redaktoro de DIA REGNO**
Pro la aparta prelego kiu temis pri la redaktado de Dia Regno la redaktoro donis neniun novan informon**.** La redaktoro denove substrekis, ke li deziras pli da kontribuantoj.

11 **Estrarelekto**
Reelektitaj estis sekretario Pavel Polnický kaj kasisto Siegfried Krüger. Nove estis elektita Ágnes Ráczkevy-Eötvös el Hungario, kiu estas preta paŝo post paŝo transpreni funkcion de la kasisto.

12 **Kongresplanoj**
Por la venonta jaro estis akceptita komuna kongreso kun IKUE – do 19-a EEK okazos en Vroclavo (PL). Por la jaro 2010 akceptis la jarkunveno inviton de hungara sekcio kongresi en Hungario (konkreta loko estos anoncita pli poste).

13 **Ideoj kaj sugestoj de la membroj**
P. Polnický kaj Bengt Olof Åradsson informis pri informa stando de KELI dum Renkontiĝo de evangeliaj kristanoj el ses landoj (SK, CZ. HU, AT, PL, DE) en Bratislava. En la stando aktivis raportantoj, Ágnes Ráczkevy-Eötvös kaj pastoro W. Rohloff, prez. de la germana sekcio, kiu organizos semajnfinan seminarion apud Zöblitz (26.–28.6.2009). Diskutitaj estis retpaĝoj de KELI, kiuj devas doni pli da aktualaj informoj. Ni serĉu personon, kiu povus zorgi pri tiu tasko.

14 **Fermo.**
Prezidanto finis la jarkunvenon kaj ni kantis kanton 859.

Protokolis:
Pavel Polnický(CZ)

Kontrolis:
Wil van Ganswijk(NL)
Sieglinde Stamm(AT)

# Invitoj por 2009: al seminario kaj al la germana KELI-jarkunveno

Wolfram Rohloff, DE

Karaj legantoj de Dia Regno, mi nomiĝas Wolfram Rohloff kaj estas de post ĉirkaŭ 2 jaroj luterana pastoro en la urbeto Zöblitz inter Chemnitz kaj Chomutov, 7 kilometrojn okcidente de Marienberg. Mi kun plezuro tralegis la raporton pri la KELI-kongreso en Slovakio. Tralegante mi bedaŭris, ke mi ne povis partopreni... Speciale kaptis mian atenton, ke – se mi ne erare legis – ĉiutage alia persono gvidis la maten- kaj vesperpreĝojn. Tiel videblas nia riĉa, kristana trezoro, ke ni (ne nur evangeliaj) kristanoj, havas ĉiuj sacerdotan rangon.

Nun mi - nome de dresdenaj Esperantistoj kaj de la germana KELI-sekcio – volas inviti vin al Internacia Esperanto-Seminario apud Zöblitz inter la 26a kaj 28a de junio 2009. Nia seminario ne estos konkurenca kun la Ekumena Kongreso en Wrocław /Breslau, kiu okazos nur dum julio 2009.

Zöblitz, mia urbeto ne situas malproksime de la ĉeĥ-germana limo. Tiel mi jam de longe povis rimarki, ke bedaŭrinde inter germanoj kaj ĉeĥoj en nia Ercmontara regiono estas malmultaj kontaktoj. Ankaŭ tial ni volas inviti vin al venontjara Esperanto-renkontiĝo.

Ni proponas la temon: *Tabuo*. Estas ja multaj tabuoj en nia moderna socio, inter la diversaj nacioj k.t.p. Foje la tabuoj helpas, foje ili malhelpas al nia vivo. Dum mia laboro mi ekzemple ofte konfrontiĝas kun la tabuo paroli kun malsanaj parencoj kaj amikoj pri la verŝajne baldaŭa morto. Jam nun ni havas kelkajn proponojn por la tema programo.

Krom la tema programo, okazos ankaŭ distra programo, ekzemple ekskurso al minejo en la najbara vilaĝo Pobershau, ekskurso al la vilaĝo Mauersberg, ekumena diservo ...

Per tiu ĉi letero mi jam nun volas informi ĉiujn membrojn de la germana KELI-sekcio, ke sabate, la 27an de junio 2009 okazos la jarkunveno de la germana KELI-sekcio en Zöblitz. Ni devos elekti ne nur novan estraron por la sekcio, sed pro juraj kaŭzoj ankaŭ alĝustigi nian statuton.


Ni volas inviti vin al kunlaboro en la tema aŭ distra programo. Ĉu vi povus prepari prelegon? Ĉu vi havas specialan hobion? Ĉu vi havas bonan ideon por la semajnfino? Aŭ ĉu ni forgesis gravan aferon?

Mi ĝojas pri viaj reagoj kaj proponoj ankaŭ tiam se vi ne povos partopreni. Mia adreso estas:

Wolfram Rohloff,
Markt 82; 09517 Zöblitz; Germanio,
++49/ 37363/ 4423; fakso: 4404,
rete: keli.prezidanto@web.de

Ĉion bonan al vi,
via Wolfram Rohloff

# Informetoj



Venis al la redaktoro kopioj de gazetaj artikoloj pri la malfermo de la ekspozicio kaj la celebro de la 100-jariĝo de la Esperanto-biblioteko en Aalen. En la biblioteko troviĝas pli ol 40 mil Esperanto-eroj kaj proksimume 21 mil titoloj. Inter alie troviĝas (la sole kompleta?) kolekto de Dia Regno. La Esp-kolekto troviĝas ekde 1989 en la urba biblioteko. De post tiam la KELI-ano Karl Heinz Schaeffer estas ĝia afergvidanto.

Apude vi vidas sur la dekstra flanko de la bildo nian kasiston Siegfried Krüger.

---

Je la fino de junio, Pavel Polnický organizis kune kun pastoro Wolfram Rohloff (prez. de la germana KELI-sekcio) informan standon pri KELI kaj Esperanto dum la Renkontiĝo de evangeliaj kristanoj el ses landoj (SK, CZ, HU, AT, PL, DE) en Bratislava. En la stando aktivis, krom la organizantoj, Ágnes Ráczkevy-Eötvös kaj Bengt Olof Åradsson.



Maldekstre: Wolfram Rohloff informas vizitantojn.
Sube: la informa stando estis bone videbla.



# Antaŭ la morto




WENN MEIN STÜNDLEIN VORHANDEN IST • EG 522 • GL 658 (str. 1, 3 kaj 4) • kp. RG (str. 1, 3 kaj 4 AÖL) • M: Frankfurt/Main 1569, Tübingen 1591 • germana T: Nikolaus Herman (1560) 1562; str. 5: Köln 1574 • E: Albrecht Kronenberger 2008

2. Jen pekoj miaj sen kompar'
la konsciencon premos,
multegaj kiel sabl' en mar',
sed tamen mi ne tremos.
Pri Via mort' meditos mi,
la ruĝajn vundojn vidos mi;
en Vi, Jesu', mi staros.

3. Mi estas membro, Krist', en Vi,
kaj tio min konsolos.
De Vi separos min neni',
angor' ne plu strangolos.
Mortante mortos mi al Vi.
Eternan vivon Vi al mi
per Via mort' pretigis.

4. Ĉar Vi leviĝis el la mort',
entombe mi ne restos.
Ĉar supreniris Vi en fort',
sen morto-tim' mi estos.
Al Vi finfine venos mi
por vivi ĉiam apud Vi.
Do iros mi kun ĝojo.

5. Mi tiel iros al Jesu',
min Lia amo tegos.
Mi pie dormos plu kaj plu,
neniu hom' min vekos
krom Krist' Jesuo, Fil' de Di';
la pordon de l' ĉielo Li
malfermos, ke ni vivu.